

## Gvidilo por plenskribi PDF formularojn

Estas diversaj manieroj akiri informojn per formularoj; UEA regule faras tion, uzante tri ĉefajn manierojn. La nuna gvidilo klarigas kiel trakti la unuan el tiuj ebloj:

- **PDF-formularo, plenskribebla kaj sendebla.**
- Dokumento Word, facile plenskribebla kaj resendebila rete.
- Reteja formularo – plenskribebla kaj forsendebla ene de hejmpaĝo

Emfazendas, ke por plenskribi PDF-formularon, sufiĉas posedi PDF-legan programon, kiu estas senpage elŝutebla de multaj kompanioj kaj nek okupas tro da diskospaco, nek voras memoron. Se vi ja posedas pli multkoston PDF-redaktan programon, ankaŭ per tio eblas plenskribi formularojn.



PDF kun aktiva formularo (almenaŭ niaj) havas plejofte nur tri specojn da respondejoj.

### 1) Hokokesto

Tio konsistas el du ebloj -  nehokita  hokita. Ofte tio signifas Jes / Ne; apudaj tekstoj klarigos la signifojn de la du elektoj.



Per neŭtrala kursoro (tipe alirata per ikono, kiu montras manon), klaku sur hokokesto por hoki ĝin kaj refoje por malhoki ĝin.

### 2) Unulinia teksta respondo

Lokoj markitaj per linio akceptas unuliniajn tekstajn enskribojn en ortangulo sidanta sur tiu linio. Klaku en la komenco de tiu linio por ricevi tekstan kursoron en la komenco de rektangulo kaj entajpu respondon. La nombro da permeseblaj signoj povos esti limigita. Ofte, tiuj tekstoj ne akceptos facile niajn supersignitajn literojn, tiukaze uzu 'h' post la litero.

### 3) Plurlinia teksta respondo

Se ni petas pli longajn respondojn, la teksto komence de la demando indikos la deziratan longecon. Aperos same nur unu linio. Komencu tajpi kiel klarigite supre. Tajpu preter la fino de la unua linio, ekaperos dekstre de la rektangulo rul-strioj kaj vi povos plue entajpi. Post tri aŭ kvar linioj via tuta teksto eble ne restos tute videbla, sed per tiuj rul-strioj vi povos supren kaj suben iri en la teksto por relegi aŭ modifi ĝin.

Kiam vi finis entajpi tekston ne necesas indiki la finon de respondado, simple klaku aliloke sur la paĝo kaj la respondo estos konservita.

Memoru savi la PDF-dokumenton post la plenskribado. Sen tio, ĉiu respondo estos perdita! Eventuale komence de la plenskribado savu la plenskribotan version sub alia dosiernomo, por konservi la puran originalon.

La formularo mem havos instrukciojn, kien sendi ĝin. Plej konvene estas sendi la rezulton rete, sed eblas ankaŭ fizike elprinti ĝin kaj sendi la rezulton per tradicia poŝto.

Se vi tajpas retadresojn en dokumento sendota elektronike, uzu <ĉe> aŭ <che> por indiki la signon @ (diverse nomita de kulturo al kulturo). Se vi ne ne faros tion, trol-robotoj povos kaperi la retadreson kaj permesi al siaj mastroj misuzi ĝin.

La nuna gvido estis pretigita surbaze de *Nuance Power PDF*, sed aliaj PDF-programoj funkcias simile, kaj la formularoj devas esti plenskribeblaj pere de ajna PDF-programo, kiu konformas al la PDF-normoj. Kaze de problemoj ĉe vi, reklamaciuj al la sendinto, kaze de problemoj vidi viajn respondojn, la ricevinto reklamacios ĉe vi!

-----

Niaj gvidiloj estas dinamikaj dokumentoj. Ne hezitu skribi, se ili ne estas klaraj, aŭ ne funkcias ĉe via komputilo/programaro. Laŭ viaj komentoj, ni aktualigos kaj kompletigos la gvidilon.

Alia gvidilo informos kiel uzi PDF-redaktajn programoj por krei tiajn formularojn.

SMG 13 oktobro 2015